



Resonas en la Eklezio disemita tra la tuta mondo la anonco de la anĝelo al la virinoj: «Ne timu! Mi scias, ke vi serĉas Jesuon, la krucumitan. Li ne estas ĉi tie. Li leviĝis... Venu, vidu la lokon, kie Li kuŝis» (Mat 28,5-6).

Enkonduko de la paska saluto far la papo Francisko

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yaho.o.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Ŝalom - Āke Ahlrén	27
Dio estas Amo	28
De konflikto al komuneco	29
Por la unueco de la homaro	30
20a Ekumena kongreso	32
Skizoj pri filozofoj-kuracistoj	33
Konciza historio ... – ĵus aperis	36
Dio ankoraŭ respondas preĝojn	37
La unua eldono de Metropoliteno	40
Kien mi iras - Vi	42
La hebrea lingvo revivigita	43
Geedziĝa gratulo	44
Pastro Bernhard Eichkorn - 80 jara	45
Informetoj	46
Ĉieloj rakontas la gloron de Di'	48

REDAKTORAJ VORTOJ

Pro la Paska mesaĝo, pro la prin-
tempa revivigado, pro personaj
cirkonstancoj kaj pro kelkaj kontribuoj
en la jena numero mi sentas min
ĉirkaŭata de morto kaj vivo – bedaŭro
kaj ĝojo. Kiu parto el tiuj paroj estu la
plej forta? Mi opinias ke tion mi parte
mem decidas. Ĉu mi permesas ke la
bedaŭro/morto regu min aŭ ĉu mi
laboras por ke la vivo/ĝojo regu mian
vivon? Kiam mi trovis kaj legis la
kontribuon de Adolf Burkhardt, kiun
li skribis jam antaŭ 50 jaroj, kune kun
la resumo de Philippe Cousson pri
konflikto aŭ komuneco inter ni
kristanoj mi same ŝatus diri ke ni mem
havas la decidon. Kio regu nian
estontecon. Certe la vojo estos flanki-
gata de bedaŭro sed ni kun espero
laboru kaj ne resigu. Mi esperas ke
la jena numero donas riĉan legadon.

Ŝalom'

SÖREN JANSON

Arr.: Lennart Jernestrand

Kviete

The musical score is written in a key with two flats (B-flat and E-flat) and a common time signature. It consists of two systems of music, each with a vocal line and a piano accompaniment line. The first system has lyrics: "Ŝa -- lom, ŝa -- - lom - - | Jen pa -- - con al vi - - - |". The second system has lyrics: "Ŝa - lom, ŝa - lom - - | Ne laŭmonda estas mi - a pac'." Chord symbols are placed above the vocal line and below the piano line. The piano line includes a "8." marking, likely indicating an octave.

*) ANALYS I D-DUR



Åke Ahlrén

Nia kara frato kaj longtempa membro
trankvile endormiĝis la 6an de aprilo.

[Nekrologo en sekvonta numero.

La supran kanteton Åke Ahlrén esperantigis, inter multaj aliaj]

Dio estas Amo

de Erwan ar Menga

Antaŭ la kristanismo, neniu religiofondinto, neniu filozofa, eĉ greka, kiel ajn profunda estis ilia kono pri Dio, malkovris aŭ kuraĝis instrui tion, kion sankta Johano rivelis al ni: “DIO ESTAS AMO”.
[1 Joh 4,8]

Tute laŭlonge de la Malnova Testamento, ni vidas, ke la dorlotata popolo estas tre ofte sendanka. Tiam Dio ĝin minacas, kelkafoje li ĝin punas, kaj ifoje tre severe por malfermi ĝiajn okulojn kaj ĝin revenigi en la lojalan vojon. Sed neniam li ĝin forlasis: “Niaj patroj ne volis obei. Sed vi estas Dio pardonema, pacienca kaj favorkora kaj vi ne forlasis ilin” [Neh 9,17]

La pekulo libere sin deturnas de Dio. Kaj nur al la pekulo nocas la peko. Dio do estus povinta forlasi la homon al lia peko kaj al ĝiaj konsekvencoj: “Kio estas la homo, ke vi lin memoras? Kio estas la filo de Adamo, ke vi pensas pri li?” [Psa 8,4]. Sed Dio ĉiam amas la homojn, eĉ kiam ili kulpas: “Li estas favorkora kaj kompatema” [Psa 103,8]; “Mi ne deziras la morton de la malvirtulo” [Jeh 33,11]

La antaŭtago de sia morto por ni, Jesuo rememorigas al ni sian grandan ordonon pri la amo: “Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian” [Joh 13,34]. Nova, ne en ĝi mem, ĉar ĝi jam ekzistis: “Amu vian proksimumon kiel vin mem” [Lev 19,18]. Sed nova kaŭze de ĝia amplekso: “Amu *eĉ* viajn malamikojn. Bonfaru al tiuj, kiuj malbonfaras al vi”... Nova kaŭze de ĝia intenseco kaj ĝia perfekteco: “Amu unu alian; kiel mi amis vin” [Joh 13,34]

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidis al li, ne pereu, sed havu eternan vivon. [Joh 3,16]

De konflikto al komuneco

Philippe COUSSON, FR

En 2017 la luteranaj kaj katolikaj kristanoj kune memorigos la 500-jaran datrevenon de la komenco de la Reformacio. Hodiaŭ, luteranoj kaj katolikoj ĝojas pro pligrandigo en reciprokaj kompreno, kunlaboro kaj respekto. Ili alvenis al agnosko ke pli unuigas ilin ol disigas ilin: antaŭ ĉio, komuna fido en la triunua Dio kaj en la revelacio en Jesuo Kristo, kaj ankaŭ agnosko de la bazaj veroj de la doktrino de pravigo.

Tio ĉi estas la unua paragrafo de la nova komuna teksto inter luteranoj kaj katolikoj (2013).

Tiu teksto celas preparon al komuna rememorigo de la Reformacio, kio antaŭ jardekoj estus tute neelpensebla. Ĝi sekvas alian gravan tekston, la “komuna deklaro pri la doktrino de pravigo” (1999).

En sia tempo tiu teksto volis

- kaj difini kion oni komune kredas, konstatante ke eĉ se ili uzas malsamajn terminojn aŭ skemojn, ili dividas inter si la samajn bazajn teologiajn principojn, inter ili la ĉefa rolo de la graco, la nura rolo de la graco en la pravigo,
- kaj ankaŭ listigis kelkajn punktojn kiuj devus esti poste pritraktitaj.

Tiu ĉi nova teksto aperas kiel komuna rigardo al la historio de la disiĝo de la 16a jarcento, kaj al la rigardo kiun la diversaj eklezioj havis pri ĝi en la daŭro de la postaj jarcentoj



kaj al ties evoluo. Oni ankaŭ analizas la diversajn temojn de la teologio de Martin Luther sub la lumo de la luteranaj-katolikaj dialogoj. La teksto poste prezentas kio devas la naturo de tiu baldaŭa rememorigo, certe ne cerebro de disiĝo sed komuna konsidero pri la pasinteco, inkluzive de konfeso pri pekoj kontraŭ la unueco, unu kontraŭ la aliaj, kaj kontraŭ la ceteraj kristanoj (ekzemple la anabaptistoj).

Fine, ĝi indikas kelkajn bazajn devigajn principojn en la ekumena dialogo inter luteranoj kaj katolikoj.

La unua gvidlinio devas esti perspektivo de unueco kaj ne de disiĝo, por trovi kio estas komuna malgraŭ ke estus pli facile trovi la diferencojn.

La dua estas la neceso akcepti esti transformata per la renkonto kun la alia kaj per la reciproka atesto pri fido.

La celado al videbla unueco devas esti tra konkretaj etapoj la tria kondiĉo.

Kvare, ili devas komune remalkovri la potencon de la evangelio de Jesuo Kristo por nia epoko.

Kaj kvine luteranoj kaj katolikoj devas kune atesti pri la graco de Dio proklamante la evangelion kaj servante la mondon.

Kompreneble tiu rapida trarigardo tra tiu dokumento proponas nur elementojn por pripensi.

Se vi havas la okazon trovi kaj legi ĝin en via lingvo, ne hezitu. Ĝi estas sufiĉe longa (245 paragrafoj) kaj ĝis nun ne tradukita en Esperanton.

Pli longan analizon mi proponos al vi en baldaŭaj numeroj kaj dum la kongreso en Trento.

œ



el Dia Regno nro 11/1966

Por la unueco de la homaro

Prelega resumo

de Adolf Burkhardt

Unu mondo aŭ neniu – tiu slogano estas tre realisma. Pli kaj pli estiĝas unu mondo, interdependa multrilate. La homoj havas en siaj manoj la rimedojn por neniigi ĝin. Granda respondeco kuŝas sur nia generacio. Estas rimarkinde, ke ĝuste nun kunsidas en Ĝenevo konferenco, kunvokita de la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj por pritrakti la temon ”Eklezio kaj Socio”. Tie do oni sentas respondecon.

Sed ĉu Dio mem havas planon kaj intencon pri unu homaro? Starigante tiun demandon, ni ja, tute konscie, jam faris antaŭdecidon, kiu ne estas logike argumentebla. Ni faris antaŭdecidon en

la fido. Ĉar ne plu estas sekreto la prijuĝo ”Dio mortis”. Granda parto de la homaro, ankaŭ en la ofte tiel nomata kristana okcidento, kredas ke la trono de Dio staras neokupita. Tiam oni ne demandas pri la intenco kaj programo de Dio.

Por ekkoni la intencon de Dio rilate al la unueco de la homaro, ni turnas nin al la Biblio. Efektive ĝi parolas pri unueco.

La homaro estas unu en la kreo: Dio kreis la homon. Li kreis la homaron. Ĝi estas unu (Agoj 17,26).

Sed la homaro estas unu ankaŭ en la ribelo kontraŭ la bona volo de Dio. Ĝi turnis sin kontraŭ sia kreinto (Rom

3,9-12). Tial ĝi estas unu sub la kolero de Dio. Kaj la homaro estas unu sub la serĉanta kompatemo de Dio. Sub la kruco de Jesuo Kristo, la mondo estas amata.. Dio celas la tutan mondon, la tutan homaron. ”Dio tiel amis la m o n d o n, ke Li donis Sian sole-naskitan Filon. . . . (Joh 3,16).

Tion Dio volas. Tio estas lia pro-gramo. Li ne volas, ke la kolero restu minace super la homaro. Lia intenco estas por paco kaj savo. La homaro estu unu sub la graco, libere akceptita, sen trudo. La tre serioza fono tamen estas, ke la homo povas fari sian decidon kontraŭ tiu oferto, do eliĝi el la unueco de la graco.

Kian modelon de la unueco laŭ la volo de Dio prezentas la kristanaro antaŭ la mondo? La skandalo de la dividiteco estas publika. En unu usona malgranda urbo mi trovis, ĉe la sama vojkruciĝo, kvar protestantaj, evange-lijajn pregejojn, en ĉiu angulo unu, ili ne rilatis unu kun la aliaj. Plej evidenta estas la skandalo, kiam ni ne povas komune partopreni en tio kio volas plej forte kunligi nin – la Sankta Mango. Ĉu ni devos atendi, ĝis ni havos la saman komprenon pri ĉiuj detaloj?

Prisilenti la diversecon certe ne helpas. Tio ne estus unueco. Sed ĉu la Biblio taŭgas kiel bazo de unueco? Ĉu ne ĉiu kristana sekto prenas siajn argu-mentojn ĝuste el ĝi?

La pli detala esplorado de la Biblio dum la pasintaj du jarcentoj klare mon- tris, ke ĝi estas multe pli kolora, varia, riĉa ol oni longan tempon pensis. Eĉ hodiaŭ multaj ne volas agnoski la inter- najn tensiojn en la Biblio, timante, ke tio rompos ĝian unuecon. Kiam oni en

la frua eklezio kompilis la norman Bibliion, la kanonon, ĉu oni ne konsciis pri la diferencoj kaj la diverseco inter la unuopaj apostoloj kaj disĉiploj? La fakto, ke apud Marko povas stari Johano, apud Paŭlo Jakobo, en la sama Biblio, estu lum-dona: La malsamaj akcentoj de la diversaj evangeliistoj, por nomi ekzemplon, nenion forprenis de la komuna baza unueco en la konfeso ”Jesuo Kristo estas la Sinjoro”. La karakteroj de la disĉiploj estis tre mal- samaj inter si. Jesuo ne ŝanĝis la karak- terojn, li ne unuformigis.

Unueco ne egalas al unuformeco kaj monotoneco. Tio ja estus mortige teda kaj enuiga. La Biblio montras grandan variecon, sed tian, kiu ne rompas la unuecon – sur komuna bazo. sub la komuna kruco de Jesuo Kristo.

Ĉu ni, per nia bona volo, povas atingi, kion ni perdis – tian unuecon en vario? Per nia bona volo, certe ne. Nur la venko de Jesuo Kristo donas al ni kaj eblecon kaj esperon. Sub lia kruco, do sub la pardono, ni povas labori kaj devas labori por pliproksimiĝi al tiu Lia lasta volo, ke ili ĉiuj estu unu. Nun ni devas trovi la vojon, kaj ni lernu unu de la alia. Aŭ ni baras kaj bremsas la intencon kaj programon de Dio, aŭ ni plenumas ĝin.

Al la nuna monda ni ŝuldas komunan ateston. Jam estas tempo, ke ĉesu la pia egoismo, kiu celas nur la propran sa- viĝon kaj lasas la alian droni. La taskoj, kiujn frontas la nuna mondo, estas grandegaj. Ili estas ankaŭ la taskoj de la kristanaro, ĉar Dio ne kreis la mondon, por ke ĝi pereu, sed por ke ĝi havu veran vivon.

20-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Infana prizorgo dum la kongreso en Trento

Mi volas informi vin, ke s-ino Norma Cescotti el Trento solvis la problemon, trovi iun, kiu povas okupiĝi pri la infanoj, dume la gepatroj partoprenos la EEK-on. Ŝi informis min per la jenaj vortoj:

“Kara Karl Heinz, fine mi sukcesis trovi solvon al nia problemo pri Veronika Kirsch. Ŝi bonvole akceptas la taskon de mi anoncita al ŝi. Do, vi povas informi la familiojn, kiuj intencas partopreni la kongreson kun infanoj, ke la afero estas

plenumita. Helpos al Veronika dum ŝia laboro ankaŭ nia amikino Tiziana Fossati, kiu tre ŝatas distri kaj amuziĝi kun infanoj. Ŝi estis instruistino de unuagrada lernejo, profesie dum pluraj jaroj.”

Mi aldonas la peton, ke ni nun ĉiuj reklamas por tiu unua faka prizorgo de infanoj dum EEK.

Elkore
Karl Heinz

Listo de la aliĝintoj ĝis 2014/04/15:

001	Marija BELOŠEVIĆ	Kroatio	018	Gabriella STIER	Rumanio
002	Giovanni DAMINELLI	Italio	019	Maria LASLO	Rumanio
003	Felice SOROSINA	Italio	020	Ildikó Terezia SCURT	Rumanio
004	Albrecht KRONENBERGER	Germanio	021	Antal FARKAS	Rumanio
005	Pierluigi SVALDI	Italio	022	Siglinde STAMM	Aŭstrio
006	Karl Heinz SCHAEFFER	Germanio	023	Bernhard EICHKORN	Germanio
007	Hedwig SCHAEFFER	Germanio	024	Flory WITDOECKT	Belgio
008	Klaus PERKO	Aŭstrio	025	Walter VAN DEN KIEBOOM	Belgio
009	Norma CESCOTTI	Italio	026	Matts LANDFORS	Svedio
010	Siegfried KRÜGER	Germanio	027	Anna LANDFORS	Svedio
011	Pavel POLNICKÝ	Ĉeĥio	028	Ruth VAN PUIJENBROEK	Svislando
012	Philippe COUSSON	Francujo	029	Agneta JÄRLSTRÖM	Svedio
013	Gianni CONTI	Italio	030	Petro CHRDLÉ	Ĉeĥio
014	Anton KIEFER	Germanio	031	Gertrudis C.A.M. DERCKS	Nederlando
015	Tiziana FOSSATI	Italio	032	Daniel CHEVALIER	Francujo
016	Václav POSPÍŠIL	Ĉeĥio	033	Marie Thérèse CHEVALIER	Francujo
017	Oldřich Arnošt FISHER	Ĉeĥio			

Skizoj pri filozoj-kuracistoj

Jesuo kuracas

DUDICH, Endre, HU

“Ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj”

(Marko 2,17, Luko 5,31)

El la kvar evangelioj (“bonaj novaĵoj”) mi kompilis la rakontojn pri la okazoj, kiam Jesuo sanigis, purigis, eĉ revivigis homojn.

“... Jesuo trairis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn, instruante en iliaj sinagogoj, kaj predikante la bonan novaĵon de la regno [de Dio], kaj sanigante ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon” (Mateo 9, 35-36)

Li diris al la senditoj de Johano la Baptisto:

“Iru kaj sciigu Johanon pri tio, kion vi vidis kaj aŭdis: blinduloj vidas, lamuloj marŝas, lepruloj estas purigitaj, surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj bona novaĵo estas anoncita” (Luko 7, 22-23)



John Bridges: Jesuo sanigas la patrino de Simon Petro

1. Kion kaj kiom Jesuo kuracis?

Evangelio de S. Mateo (18 okazoj)

- **4,23-24** ĉian malsanon kaj malfortaĵon, demonhavantojn, lunatikojn (epilepsulojn?) kaj paralizulojn
- **8,2-4** paralizulon (filon de romia centestro, distance)
- **8,14-15** februlinon (la bopatrino de Petro, per mantuŝo)
- **8,12** du demonhavantojn
- **9,18-21** knabinon mortan
- **9,27-30** du blindulojn, tuŝante iliajn okulojn
- **9,32-34** mutan demonhavanton
- **11,4-5** blindulojn, lamulojn, leprulojn, surdulojn, eĉ mortintojn
- **12,22** demonhavantan blindulon kaj mutulon
- **14,36** per tuŝo de lia mantelo
- **15,22** filinon de Kanaanino turmentatan de demono (“granda estas via fido”, 15,28)
- **15,30-34** homojn lamajn, blindajn, mutajn, kriplajn
- **17,18** frenezan knabon demonhavantan
- **20,30-34** du blindulojn, tuŝante la okulojn
- **21,14** blindulojn kaj lamulojn en la templo

Evangelio de S. Marko (11 okazoj)

- **1,23-26** viron kun malbona spirito, per komando
- **1,32-34** malsanulojn kaj demonhavantojn
- **1,40** leprulon, tuŝante
- **2,5-12** paralizulon
- **3,1-5** velkintan manon, nur per komando
- **5,2-15** demonhavanton
- **5,25-34** virinon kiu havas sango-fluon., tuŝantan la mantelon de Jesuo. “Eliris potenco”
- **5,35-42** mortintan filinon de la sinagogestro, per komando
- **7,26-30** demonhavantan filinon de Grekino
- **8,22-26** blindulon, per ripetita mansurmeto
- **9,17-27** knabon kiu havis mutan spiriton, per preĝado
- **10,46-52** blindan almozulon: “via fido vin savis”

Evangelio de S. Luko (20 okazoj)

- **4,33-35** demonhavanton, “kun aŭtoritato kaj potenco”
- **4,38-39** la febrohavantan bopatrion de Petro
- **4,40-41** diversajn malsanulojn ,“li metis sur ĉiun el ili la manojn”
- **5,12-13** leprulon
- **5,18-25** paralizulon
- **6,6-10** velkintan dekstran manon, sabate
- **6,18-19** ĉiujn; potenco eliris el li
- **7,2-10** sklavon de romia centestro “sed vorton parolu, kaj mia knabo saniĝos”, [7,7]
- **7,11-15** mortintan junulon de Nain, tuŝante la portilon kaj komandante

- **7,21-22** ĉion
- **8,27-33** demonhavanton (pelante la demonon en gregon de porkoj)
- **8,40-55** mortintan filinon de la sinagogestro Jairus (prenante ŝian manon kaj komandante)
- **8,43-48** virinon kiu havas sango-fluon; eliris potenco
- **9,11** tiujn kiuj bezonas kuracadon
- **9,38-42** knabon kiu havis malbonan spiriton
- **11,14** mutan demonulon
- **13,11-13** kunkurbitan virinon, metante sur ŝin la manojn
- **14,2** hidropsulon, sabate
- **17,11-19** dek leprulojn (nur unu revenis danki)
- **18,35-43** blindulon, “via fido vin savis”

Evangelio de S. Johano (4 okazoj)

- **4,46** filon de kortegano
- **5,2-9** malfortulon ĉe la lago Betesda en Jerusalemo



Palma Giovane: Jesuo sanigas ĉe Betesda

- **9,1-11** denaskan blindulon, metante koton sur la okulojn
- **11,1-44** Lazaron jam mortintan

Specoj kaj nombroj de kuracitoj (konsiderante la plurfoje rakontitajn kazojn kiel unu):

- 14 lepruloj,
- pli ol 10 blinduloj,
- 6 paralizuloj,
- 3 mutuloj, lamuloj,
- po 1-1 sangofluo, velkinta mano, februlo, surdulo, kriplulo, hidropsulo, kunkurbitulino, lunatiko (epilepsulo),
- 9 demonhavantoj,
- 3 mortintoj

Mateo pleje insistas pri la miraklaj kuracadoj. Luko estas la plej akurata fake, ĉar laŭ la tradicio li mem estis kuracisto. En la Ago de la Apostoloj, li skribis jene pri kuracado farita de la apostoloj Petro kaj Johano:

“Li prenis la manon [de la denaska lamulo] kaj levis lin; kaj tuj liaj plandoj kaj maleolostoj fortiĝis, kaj li suprensalte stariĝis kaj piediris” (Agoj 3, 7-8)

Johano selektis nur kvar ekzemplojn, sed li tre detale – en tuta ĉapitro – rakontas unu el ili, nome la revivigon de Lazaro.

2. Kiel Jesuo kuracis?

- Per korpa kontakto, mantuŝo, mansurmeto (Luko, 4,40; 13,13)
- Eliris el li potenco (Marko 5,30; Luko 8,46)
- Per preĝado kaj fastado (Mateo 17,21)
- Helpe de la kredo / fido de la kura-

cotulo (Mateo 9,22; Marko 5,34; 10,52; Luko 18,42)

- Per parolata komando kun aŭ sen fizika signo, ankaŭ el konsiderinda distanco. Estas klare distingitaj la malsanuloj kaj la demonhavantoj. En la kazo de demonhavanto, Jesuo ne parolas al la homo, sed al la demono.

La malfido malhelpas: en lia patrujo, la urbeto Nazareto *“pro ilia nekredemo li faris...ne multajn potencaĵojn.”* (Mateo 13,58; Marko 6,5; Luko 4,24).

La efiko estas tuja kaj daŭra, en pluraj okazoj devige kontrolita de la kompetentaj pastroj.

La povo de kuracado estas transdonebla al la disĉiploj: Jesuo

“kunvokis al si la dek du disĉiplojn, kaj donis al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj, por elpeli ilin, kaj por sanigi ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon” (Mateo 10,1). *“Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn: en mia nomo ili elpelos demonojn; ili parolos per lingvoj;...sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos.”* (Marko 16, 17-18)

Tio inkluzivas ankaŭ la kuracadon de la animo, t.e. la pardonon de pekoj kaj krimoj: (Luko 5,24-25). Jesuo ankaŭ tiun potencon transdonis al siaj disĉiploj:

“Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonas, al tiuj ili estas pardonitaj; kies vi retenas, estas retenitaj.” Joh 20, 22-23).

Pluraj sanigoj estas priskribitaj en la Agoj de la apostoloj: 3,6-8; 5,15-16; 8,7; 9,33-41; 14,8-10. Ankaŭ tiu libro estas atribuita al la apostolo Luko.

*

FARKAS József skribas en sia libro Pneumatoszféra: “Verŝajne ne bezonas pruvon, ke la kristanismo komence estis kuraca, terapia movado; se vi preferas, psikoterapia movado. Tamen, se oni volas paroli tre precize, oni devas diri, ke ĝi estas pneŭmoterapia movado. [pneŭma =spirito]. Jesuo Kristo kuracis per la potenco de la Spirito de Dio. (La vortoj kuracado kaj saniĝo estas nun uzataj plej larĝ-sence.)

Estas sufiĉe konate, ke ekzemple la farizeoj ankaŭ en la malsano serĉis la pekon, kaj mallaŭdis ĝin. Jesuo, male, traktis kaj kuracis ankaŭ la pekon kiel malsanon. Laŭ Jesuo, la nescio estas malsano; la malforteco estas malsano; la demonhavo estas malsano... Jesuo estis kuracisto, kaj lanĉis kuracan movadon.

Liaj malamikoj bonege sciis, ke Jesuo kuracas pneŭme, sed ili mallaŭdis kaj kalumnis lin, dirante, ke li kuracas per malpuraj spiritaj efikoj, laŭ la tiama formulado per la potenco de Belzebub [la estro de la “muŝoj”, t.e. de la demonoj aŭ diabloj, Mateo 12,24; Marko 3,22; Luko 11,15] Sed Jesuo diris plen-konscie: “*Mi elpelas la demonojn per la Spirito de Dio.*” [Mateo 12,28; 11,20]”

(FARKAS, József: Pneumatoszféra. - A segítésre kész szellemi világ. Nyolc evangelizáció. – 80 oldal. Somhegyi Kiadó és Nyomda Kft, Velence, 2004 karácsony –


Pneŭmatosfero. La helpopreta spirita mondo. Ok evangelioj. – 80 paĝoj – Eldonejo kaj presejo Somhegyi, Velence, Kristnasko 2004)

☞

Ĵus aperis nova libro

Gerrit Berveling verkis novan libron, ĉi-foje koncizan historion de Kristanismo. Inter alie la aŭtoro skribas en la antaŭparolo ke: “La libreto, kiun vi nun tenas en la manoj, ... neniel pretendas esti scienca historio pri Kristanismo, tamen historio ĝi ja estas, kaj eĉ sufiĉe serioza. Sed temas pri tre persone verkita historio. ... Por mi persone la pli frua Kristanismo ĉiam estis kaj restis la pli interesa parto. Tion la legontoj certe rimarkos. Kaj mi verkas kiel esperantisto: ĉie, kie mi nur povas, mi enmetis bibliografiajn atentigojn pri ekzistantaj Esperanto-tradukoj.”

Gerrit Berveling
Van Vredenburgweg 435
2284 TA Rijswijk, Nederlando
+70-213 4914



Dio ankoraŭ respondas preĝojn!

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

***H**ALELUJA! Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco. Kiu eldiros la potencon de la Eternulo, aŭdigos Lian tutan gloron?*

Psalmo 106: 1, 2

Miaj gepatroj travivas per la preĝo

Mia patro estis instruisto en la norda Usono kiam Dio vokis lin por esti evangelia pastoro. Kiel instruisto, mia patro gajnis sesdek dolarojn monate. (Estis la tempo kiam nova aŭtomobilo Ford aŭ Chevrolet kostas sescent dolarojn.) Plue, li loĝis kun sia nova edzino en la farmbieno de siaj gepatroj. La nutraĵo tie estis abunda kaj bona. Ĉion tion miaj gepatroj forlasis kiam ili foriris kaj ekloĝis en alia ŝtato (kie mi naskiĝis) por zorgi malgrandan preĝej-anaron.

Kiel pastro, mia patro ricevis ok dolarojn semajne, se tiu sumo estis en la monokolekto. Ofte ne restis mono post kiam la patro pagis la luprezon de kvar dolaroj semajne. Kiam tio okazis, la gepatroj malsatis kaj devis preĝi por ke Dio plenigu ilian bezonon. Ĉiam Dio tion faris. Unufoje, en mezvintro, la patro ĵetis la lastan pecon de brulligno en la hejtfornon. Estis malvarmege kaj estis multe da neĝo ekstere. Ne estis mono por aĉeti brullignon. Kion fari?



La gepatroj surgenuiĝis kaj preĝis al Dio por ke Li rapide sendu brullignon. Kiam ili finis la preĝon, jen homo kun ŝarĝvagono tirita de ĉevaloj kaj plenita de brulligno eniris la korton. Antaŭ pluraj horoj ol miaj gepatroj preĝis, Dio estis sendinta la respondon!

Dio respondas la preĝojn de knabeto

Pro tiaj travivaĵoj mi frue lernis pri la potenco de la preĝo. Mi rememoras kiam mi deziris ricevi ludilan trajnon kiel Kristnaskan donacon. La gepatroj

klarigis al mi, ke ili estas senmonaj. Kion fari? Ili preĝis kaj Dio provizis iliajn bezonojn. Do, mi preĝis pri mia bezono – ludila trajno! Post ne longe, viro alvenis en nian vilaĝon kiu vendis ludilajn trajnojn vizitante la domojn. Li vendis ĉiujn siajn ludilojn krom unu. Tiu homo alvenis al nia hejmo kaj donacis la lastan trajnon al la gepatroj por mia Kristnaska donaco.

Dio estas respondinta preĝojn pli gravajn ol tiujn, kiujn mi faris al Li, sed mi ĉiam rememoras la fojon kiam Li respondis la preĝon de knabeto.

Mi havis pli malpli la saman aĝon kiam mi forte tranĉis tri aŭ kvar fingrojn de unu mano, ludinta kun akva man-pumpilo. Mi multe sangis. La gepatroj interparolis pri mia transporto al la kuracisto. Mi aŭskultis ilin kaj mi subite demandis: “Kial vi ne preĝas?” (Ili havis fidon pri ĉiuj aliaj aferoj, kial ili ne havis fidon pri mia problemoj?) Tre hontitaj, la gepatroj preĝis, zorge bandaĝis la fingrojn, kaj ne portis min al la kuracisto. Nuntempe, mi ne scias kiuj fingroj de kiu mano estis tranĉitaj. Ili resaniĝis tute sen cikatroj.

Kvankam miaj gepatroj estis kristanoj, tio ne faris min kristano ĉar Dio ne havas nepojn! Mi iĝis kristano je la aĝo de kvin jaroj. Mi ne povis legi, sed mi sciis, ke mi estas pekulo: mi estis kolerinta kontraŭ la gepatroj, mi estis mensoginta, k.t.p. Mi komprenis, ke Kristo, la Filo de Dio, verŝis Sian sangon kaj mortis pro miaj pekoj. Kaj mi aŭdis el la Biblio ke Kristo releviĝis kaj vivas. Mi komprenis, ke mi bezonas akcepti Kriston en mian vivon. Mi

konfesis miajn pekojn al Kristo kaj mi fidis al Li kiel mia Savanto.

Longe antaŭ mi povis legi, mi lernis ĉi tiun versiklon de la Biblio: “*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidis al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*” (Johano 3.16). Kiel knabeto de kvin jaroj, mi spertis la amon de Dio kaj ekposedis la certecon, ke je la momento de la morto mi tuj iros por esti kun Dio.

Dio resanigas mian patron

Mia patrino subite mortis kiam mi havis 13 jarojn. Preskaŭ du jarojn poste, mia patro malsaniĝis. Li havis febron kaj plurajn aliajn simptomojn. Kuracisto ekzamenis lin kaj ordonis fari radioskopiajn fotojn de liaj pulmoj. Poste la kuracisto diris al la patro: “La fotoj montras ke io kreskas en unu el viaj pulmoj. Eble ĝi estas kancero aŭ tuberkulozo. Vi devus eniri en malsanulejon por ricevi kuracadon.”

Antaŭ ol mia patro eniris la malsanulejon, li telefonis la novaĵojn al sia fratino en alia ŝtato. Ŝi loĝis kun sia edzo en farmbieno 500 kilometrojn distance de ni. Mia onklo tre fidis je Dio kaj ŝi estis ricevinta multajn respondojn al siaj preĝoj. Kiam ŝi aŭdis, ke mia patro estas malsana, ŝi kunvokis kelkajn el siaj amikinoj kaj ili preĝadis por li. Tiam mia patro eniris la ŝtatan malsanulejon.

La kuracistoj en tiu loko ordonis pli da radioskopiaj fotoj. Por fari tion, ili kolapsigis la pulmon per medikamento. Poste, la patro preskaŭ mortis pro senatenta flegisto. Kiam li resaniĝis de

tiu procedo, pluraj kuracistoj eniris lian ĉambron. “Estas strange,” ili diris. “La fotoj, kiujn ni faris montras, ke nenio estas tie en via pulmo. Ni deziras fari pli da fotoj.”

La patro demandis, “Tio estas riska, ĉu ne?” “Jes,” diris la kuracistoj, “tio estas riska.” “Do, mi ne permesas ke vi faru tion denove. Mi havas du filojn hejme sen patrino” respondis la patro. “En tia kazo,” diris la kuracistoj, “vi devas subskribi ellasan paperon. Sed, se vi tion faros, vi neniam povos reveni ĉi tien.” “Bone,” diris la patro, “mi subskribos la paperon. Mi scias, ke Dio faris ion en mi.”

Li subskribis la paperon kaj revenis hejmen. Post du aŭ tri monatoj, la patro ricevis leteron de tiu malsanulejo: “S-ro

Goldsmith, ni petas vin, ke vi revenu ĉi tien. Ni deziras ekzameni vin denove.” La patro skribis: “Mi dankas vin. Sed mi ne reiros al la malsanulejo. Mi ĝuas perfektan sanon.” Ek de tiu jaro 1952 ĝis sia morto en 1978, mia patro neniam malsaniĝis denove je la pulmoj. Li mortis de koratako kiam li havis 76 jarojn.

Pro tiu resanigo, kiun Dio faris en la pulmo de mia patro, kaj pro aliaj resanigoj, kiujn mi estas vidinta, estas tre facile por mi kredi la rakontojn pri resanigoj, kiujn mi legas en la Biblio. Estas la afero plej grava en la mondo koni kaj ami kaj servi tiun Dion, kiu faras tiajn miraklojn.



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

1. aprilo

Ĉiela Patro, malfermu miajn okulojn por la mirindaĵoj de Via boneco. Ili ja fariĝis jam tute kutimaj por mi. Mi tutkore laŭdu Vin pro ili, kaj mi ĉiutage denove miru pri ili.



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 26). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

La unua eldono de METROPOLITENO *

Ed Borsboom, NL

Kiam mi en la komenco de la 70-aj jaroj laboris super la biografio “Vivo de Lanti”, mi legis la protokolojn de la SAT-kongresoj. En tiu de 1928 sub la rubriko pri la literaturaj SAT-eldonoj staris la frazo: *Precipe nin interesas la sorto de jena verko ”Inter du bordoj” de V. Varankin*. Tio kaptis mian atenton, ĉar eble la ruso Varankin riĉigis la esperantan beletron per valorajo. Mi nepre volis akiri la libron, sed neniu povis helpi, nur iu diris, ke la posta definitiva titolo fariĝis “Metropoliteno”. Jam komenciĝis la perdo de espero, sed en 1973 okazis miraklo.

Andreo Cseh grimpis kun mi tiam en la Esperanto-Instituto en Hago al ĝia subtegmento por montri tiun lokon. Starante en la polva kaj ne tre luma ejo inter kestoj kaj skatoloj mi subite vidis



Varankin, la jaro 1931

sur fenestro-breto unu kadukan libron. Mi surprizite vidis la titolon “*Metropoliteno*” kaj sub ĝi “*eldonon 1933 en Amsterdam*”. Ĉu vi legis ĝin? Ne, respondis Cseh, sed mi uzis ĝin en la 30-aj jaroj. Tiutempe mi vizitis influriĉajn personojn por propagandi nian lingvon. Ili ofte reagis, ke en Esperanto ekzistis nur kajeroj kaj broŝuroj. Por senfortigi la argumenton mi kunportis tiun dikan volumon.


Aperas nun la demando: Kial migris manuskripto, kreita en Moskvo, al Amsterdamo por esti eldonita? Varankin finis la verkadon de la romano ie en 1932. En tiu jaro ĝia eldono en Sovetio ne plu bone eblis, ĉar la enhavo ete kritikis la registaron, iom tikla faro. Krome la vorto Esperanto jam tiam sonis tie suspekta. La foliojn la aŭtoro sendis en 1932 al Germanio, pro tio, ke en Leipzig la juna komunisto Walter Kampfrad estis fondinta en 1930 la esperantan eldonejon Ekrelo. Ĝi publikigis precipe tekstojn de rusaj aktivuloj. Evidentas, ke “*Metropoliteno*” povis trovi tie bonan lokon.

Antaŭ ol la preso efektiviĝis, la hitleranoj akaparigis en januaro 1933 la potencon. Ili tuj ekĉasis komunistojn kaj inter alie enkarcerigis Kampfrad. Tiu ĉi lastminute transigis la materialon al Amsterdamo, ĉar en la nederlanda ĉefurbo troviĝis inter la samideanoj grupo da fidelaj amikoj de Sovetio.

Tiuj ĉi apenaŭ posedis monon por la aperigo de supozeble 2000 ekzempleroj**. Trovante presiston, kiu petis plej malaltan sumon kaj uzis plej primitivan paperon, ili samjare realigis la projekton. Pro la modesta rego de la Internacia Lingvo kaj la ne-agleca kontrolo de la presprovajoj svarmas eraroj en la prozo. Tamen monumentan faron plenumis la amsterdamaj kamaradoj: ili savis unu el la plej gravaj esperantaj romanoj de la pereoj. Omaĝon al tiuj sindonuloj.

Sed kiu aĉetis la ducentpaĝan bel-etraĵon? Malmultaj! En Okcidenta Eŭropo la majoritato de la verdsteluloj rigardis kun skeptiko al la situacio en Sovetio. Aĉeti produkton el tiu ŝtato signifis moralan subtenon al ties reĝimo. Plie pro la monda krizo kreskis la aro de senlaboruloj, kiuj apenaŭ havis monon por aĉeti “luksaĵojn”. Kaj en la lando de Varankin mem Esperanto fariĝis tiel danĝera, ke ĝiaj adeptoj kaŝis aŭ detruis siajn esperantajn objektojn.

Laŭ hipotezo mia ekzistas nun en la tuta mondo nur pli malpli 20 ekzempleroj de tiu unua eldono. La ceteraj



1992-jara eldono

atingis la rubujon, forĵetitaj de filoj kaj nepoj de la posedantoj aŭ detruitaj de la eldonejo mem. Je mia miro mi vidis inter la brokantaĵoj ĉe IEL unu ekzempleron kun la prezo de 50 eŭroj. Fakte bagatela sumo por tia unikaĵo.

* ekzistas 2-a eldono 1977, 3-a 1992, 4-a 1992

** ne pruvita nombro, sed kutime la kvanto en la 30-aj jaroj

☪

Ĉerpo el la libro:

Berlin ... de aprilo 1928.

Berlina aero instigas al verkado. Ĝi kreas la humoron. Mi, kiel ĉiu inteligentulo, ne povas verki sen la humoro. Jen, ekzemple: tra la malfermita fenestro estas videblaj mallarĝa tegola tegmento, radiomasto, du mansardaj fenestroj kaj kamen-tuboj. Malsupre kuŝas ŝtona puto — la korto kaj aŭdiĝas kanto pri

Stefano Razin. La konata melodio sonas mirinde kortuŝe. Fingroj de la lerta harmonikisto faras el ĝi jen molan, dolĉan muzikon, jen fortan, potencon proteston. La harmonikisto ne havas piedojn kaj staras per iuj strangaj tre mallarĝaj kaj mallongaj hakpecoj.

Subita ekstremo trapenetas min. Mi rememoris unu aŭtunan vesperon. Per ĉi tiu novembra nebula vespero mi komencas mian romanon. ☪

Kien mi iras – Vi !

Kontribuis Siegfried Krüger, DE

Kiu preĝas, ne estas sola. Martin Buber el la orienteŭropa tradicio kreis preĝon laŭsence de la psalmo 139, kio impresinde transformas la bazan sperton de la protekteco en la dia estanteco.

Tiel en ĉi tiu preĝo mirinde estas realigita la Di-nomo kaj ties proksimeco, amo kaj fideleco. Kiu kredas neniam estas sola, ĉar Dio ĉiujn vojojn kuniras.

La specialaĵo de ĉi tiu preĝo estas kaŝita en la 26 fojan nomiĝon de la vorto *VI*. La hebrea lingvo ne havas nombrojn, sed la nombrovaloro estas – kiel en la greka – ligita kun literoj.

La nombrovaloro de la Di-nomo JHWH, kiu signifas fidela kunirado, ekzisto kaj solidareco estas 26.

Vi *Kien mi iras – Vi !
Kie mi staras – Vi !
Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !
Vi – Vi – Vi !
Se mi bonfartas - Vi !
Se mi suferas - Vi !
Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !
Vi – Vi – Vi !
Ĉielo – Vi ! Tero – Vi !
Supre – Vi ! Malsupre – Vi !
Kien mi turniĝas – kie finiĝas,
Nur Vi, ree Vi, ĉiam Vi !
Vi – Vi – Vi !*

Martin Buber (1878-1965)

[La poemo jam estis publikigita en Dia Regno numero 1/2010]

Psalmo 139 (ĉerpoj)

Vi min esploras kaj min konas. Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi leviĝas; Vi komprenas mian penson de malproksime. Kiam mi iras kaj kiam mi ripozas, Vi estas ĉirkaŭ mi, Kaj ĉiujn miajn vojojn Vi konas. ... De malantaŭe kaj de antaŭe Vi

ĉirkaŭbaris min Kaj metis sur min Vian manon. ... Kien mi iros for de Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo? Se mi leviĝos al la ĉielo, Vi estas tie; Se mi kuŝiĝos en Ŝeol, jen Vi tie estas. Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenuĝo, Ĉu mi loĝiĝos sur la rando de la maro: Ankaŭ tie Via mano min kondukos, Kaj Via dekstra mano min tenos. Se mi diros: Mallumo min kovros, Kaj la lumo ĉirkaŭ mi fariĝos nokto: Eĉ mallumo ne mallumas antaŭ Vi, Kaj la nokto lumas kiel tago; Mallumo fariĝas kiel lumo. Ĉar Vi kreis mian internaĵon, Formis min en la ventro de mia patrino. Mi gloras Vin, ĉar mi estas mirinde kreita; Mirindaj estas Viaj kreitaĵoj, Kaj mia animo tion bone konscias. Ne estis kaŝitaj antaŭ Vi miaj ostoj, Kiam mi estis kreata en kaŝiteco, Kiam mi estis formata en la profundo de la tero. ... Kiam mi vekigis, mi estas ankoraŭ kun Vi. ... Per ekstrema malamo mi ilin malamas; Ili fariĝis por mi malamikoj. Esploru min, ho Dio, kaj konu mian koron; Provu min kaj sciu miajn pensojn. Kaj rigardu, ĉu mi estas sur malbona vojo, Kaj gvidu min sur la vojo de eterneco.

ו ה ו ה ו (JHWH)

5 (=H), 6 (=W), 5 (=H), 10 (=J)

10+5+6+5=26

La hebrea lingvo revivigita en moderna tempo

– kaj ĝia “kreinto” Eliezer Ben-Jehuda

Bengt Olof Åradsson, SE

Lingvoj evoluas kaj lingvoj mortas. Ne ofte okazas, ke lingvoj estas revivigitaj kaj poste bone funkcias. Unu ekzemplo tamen estas la hebrea lingvo.

La plej konata homo malantaŭ tiu okazaĵo estas Eliezer Ben-Jehuda. Li naskiĝis la 7an de januaro 1858 en Luĵkio en Belorusio kaj mortis la 21an de decembro 1922 en Jerusalemo. Oni konsideras lin esti unu el la plej gravaj fortoj revivigi la hebrean lingvon kiel *parolata* kaj *gepatra* lingvo, do ĉiutaga lingvo. Antaŭe la lingvo estis uzata precipe kiel liturgia lingvo.

Dum la infanaĝo Eliezer studis, laŭ la kutimo inter la judoj en Orienta Eŭropo, jidon, Toraon, Miŝnaon kaj

Talmudon. Dum la postaj studoj li krome lernis plurajn aliajn lingvojn kaj studis ankaŭ ne-religiajn verkojn. Li renkontis cionismon legante jidan gazeton kaj konkludis, ke revivigita hebrea lingvo en “la Lando Israelo” povus unuigi la judojn dise en la mondo. Li opiniis, ke la hebrea lingvo povas vivi nur se la nacio reviviĝas kaj revenas al la patra lando.

En 1881 Ben-Jehuda elmigris al Palestino. En tiea etoso li dediĉis sin al la transformo de la hebrea lingvo al moderna ĉiutaga lingvo. Ben-Jehuda estis forta motoro por fondi komitaton de la hebrea lingvo. Li verkis la unuan vortaron de la moderna lingvo kaj por tio kreis multajn novajn vortojn. El tiuj multaj estas uzataj hodiaŭ, sed ĉirkaŭ 2000 vortoj ne trovis uzantojn. Ekzemple li proponis por tomato la vorton *badura*, sed la parolantoj hodiaŭ uzas la vorton *agvania*.

Por la vortaro li uzis kaj antikvajn lingvojn kaj modernajn ĉirkaŭajn lingvojn. Influis la lingvon ankaŭ okcidenteŭropaj lingvoj.

La projekton kaj la revivigadon ne ĉiuj aplaudis, precipe la ultra-ortodoksa komunumo kontrauis, ĉar por ili la hebrea lingvo pro ĝia uzo liturgie kaj dum religia studado estis “sankta” lingvo.

Dufoje Ben-Yehuda estis edziĝinta.



La unua edzino mortis pro tuberkulozo 1891 kaj lasis kun la edzo 5 infanojn el kiuj 3 mortis pro difterio sufiĉe rapide. La lasta deziro de la edzino estis ke Ben-Jehuda edziĝu al ŝia fratino kaj tion li faris.

La filo de Ben-Jehuda dum sia infanaĝo kreskis kun la hebrea lingvo kaj tiel fariĝis la unua denaska parolanto de moderna hebrea lingvo. Hodiaŭ ĉirkaŭ 9 milionoj parolas la hebrean lingvon. El tiuj ĉirkaŭ 3 milionoj estas denaskaj parolantoj.

Eliezer Ben-Jehuda mortis pro tuberkulozo en decembro 1922 kaj estis entombigita sur la Olivarba monto. Dum la enterigado partoprenis 30 000 homoj.

[La teksto baziĝas sur informoj trovitaj sur paĝoj de Vikipedio kaj en la libro: *I DŌDA SPRĀKS SĀLLSKAP* de Ola Wikander [“En la akompano de mortaj lingvoj”]

☞



Gabriella Stier & Oldřich Arnošt Fischer



Ni gratulas al la geedziĝo inter Gabriella Stier (RO) kaj Oldřich Arnošt Fischer (CZ). La geedziĝo okazis sabate 12. 4. 2014 en Brno.

Pastro Bernhard Eichkorn – 80 jariĝis

Raportis Siegfried Krüger, DE

Karaj legantoj, mi partoprenis la 23an de marto, tagon post la 80jariĝo de pastro Bernhard Eichkorn en Villingen, kie li vivas kaj kie li estis pastro 1988 – 2003. Mi ĉeestis Diservon kaj Sanktan Manĝon je la 11a horo kun multaj homoj el la paroĥo kaj invititaj Esperantistoj. Poste sekvis tagmanĝo kun pli ol 100 homoj kaj plenprograma posttagmezo. Estis jam la dua festotago al kiu ne nur Bernhard invitis. Erika Discher, lia

dommastrino dum 40 jaroj, antaŭ kelkaj semajnoj jam 80jariĝis kaj kunfestis kun sia fratino, kiu 70jariĝis. Ĉar Erika estas unu el 10 infanoj, vi povas imagi la grandecon de la parenkaro, al tiu apartenis ankaŭ parencoj de Bernhard.

Ĉiu gasto ricevis donace 141-paĝan libron “Bernhard Eichkorn/ Mia vilaĝo, mia urbo kaj la Dia Kompatemo”, en kiu ankaŭ Esperanto havas firman lokon.

Li ne estus B.E., se li nur elspezus monon. Antaŭ 17 jaroj li konatiĝis kun la afrikano Gabriel Anda, kiu pastrigis per lia kaj amikara helpo. Pastro Anda nun estras ankaŭ katolikan sendstacion “Radio Maria Kamerun” kaj li esperantistiĝis per Bernhard.

Mia amikeco kun B.E. estas parto de la amikeco kun Adolf Burkhardt kaj Albrecht Kronenberger kaj kreskis dum multaj kongresoj. Okaze de la novel-dono de la Biblio kaj de ADORU, kiam mi estis kasisto de KELI, firmiĝis tiu amikeco.



Distingo: Werner Pfennig el Neubrandenburg

Jen informo pri interesa okazaĵo en nord-orienta Germanio. Werner Pfennig el Neubrandenburg ricevis distingon de SPD de nia regiono. Transdonis ĝin elstara ekspolitikisto Franz Müntefering, la laŭdacion prezentis pastro Jörg Albrecht el la urbo.

Sur la foto de maldekstre: prezidantino de landa parlamento Sylvia Bretschneider, pastro Albrecht, Werner Pfennig, Franz Müntefering.



Kerttu Ekman

Mi ricevis informon, ke finna antaŭa keliano Kerttu Ekman mortis la dekan de aprilo en la hejmo por maljunuloj (Kerttuli) en Turku. Ŝi estis jardekojn membro de la finna Sekcio de KELI, laŭ mia scio june ŝi ankaŭ partoprenis kongresojn de KELI eskterlande. Ofte ŝi gastigis

eskterlandajn esperantistojn en Turku. Ŝi estis tre afabla kaj lumiga kristano. Lastatempe eskterlandaj esperantistoj demandis ofte pri ŝi, ĉar ŝi ne plu povis respondi al salutmesaĝaĵoj.

Amike
Synnöve Mynttinen



Karl-Heinz Schaeffer ricevis la kulturpremiion FAME

Karl-Heinz Schaeffer kaj Utho Maier (direktoro de la Germana esperanto-biblioteko en Aalen) ĉi-jare estis honorigitaj per la FAME-premio.

La *FAME-Stiftung.de* kune kun la urbo Aalen kreis la Esperanto-kulturpremiion per kiu oni honorigas personojn, instituciojn kaj organizaĵojn. Laŭ la kontrakto kun Aalen la urbo helpas per servoj dum la premiado per okazigo de la solena matineo.

Plej alta premio

La premio havas altecon de 3.000 eŭroj – temas pri la plej alta premio en la Esperanto-mondo; oni povas dividi la premion inter pluraj personoj. Per tiu premio FAME kaj la urbo Aalen volas:

- subteni la Esperanto-kulturon;
- veki pli da intereso por la Esperanto-kulturo;
- plifortigi la konsciencon en la publiko pri la valoroj de Esperanto kiel kultura lingvo;
- garantii la sidejon de la Germana Esperanto-Biblioteko.



Supra bildo: Karl-Heinz Schaeffer dankas pro la premio
Apuda bildo: La premiito Utho Maier dankas



Fotogalerio: <http://esperanto-bw.de/pages/eo/fotogalerio/fame-kulturpremio/2014.php?lang=EO>

Ĉieloj rakontas la gloron de Di'

(Originale verkita)



1. Ĉi - e - loj ra - kon - tas la glo - ron de Di'.
2. Mal - su - pre mi i - ras laŭ vo - jo de plor'.
3. Do ga - ju, a - ni - mo, o - ma - ĝu al Li.



Mi - re - ge mi le - vas la ko - ron al Li.
Sed su - pre a - ten - das min ĝo - jo kaj glor'.
Ek - pa - ŝu, ek - a - gu, ku - ra - ĝu en Di'.



Mi - re - ge mi le - vas la ko - ron al Li.
Sed su - pre a - ten - das min ĝo - jo kaj glor'.
Ek - pa - ŝu, ek - a - gu, ku - ra - ĝu en Di'.

ĈIELOJ RAKONTAS LA GLORON DE DI' • M (Am Himmelsgrund): Antonius Klönne •
kun afabla permeso • E (originale verkita, 1a linio: Psa 19,2): Albrecht Kronenberger
2014-03-31

Jen la koncerna germana (ne-religia) poemo:

Der Bote

*Am Himmelsgrund schießen
so lustig die Stern,
dein Schatz lässt dich grüßen
aus weiter, weiter Fern!*

*Hat eine Zither gehangen
an der Tür unbeacht',
der Wind ist gegangen
durch die Saiten bei Nacht.*

*Schwang sich auf dann vom
Gitter
über die Berge, übern Wald -
Mein Herz ist die Zither,
ibt ein'n fröhlichen Schall.*

Joseph Freiherr von Eichendorff, aus: Das Schloss Dürande 1837